

Slovakio (ne)konata

Slovakio estas por multaj nemalkovrita lando. Gustumu la senton de malkovranto, kaj ekkonu centojn da neatenditaj interesaĵoj kaj sekretoj en urboj kaj vilaĝoj, sur montoj kaj en valoj. Slovakio estas lando, kie vi povas senti vin vera vojaĝanto, kiu ĉiam havas ion por malkovri.



Slovakoj estas emociplena popolo, emocie travivanta siajn ĝojojn, sukcesojn, malĝojojn kaj elreviĝojn. Ili estas sinceraj, amikemaj, malfermitaj, bonkoraj, gastamaj, sed ankaŭ ofendigemaj. Kaj per tio ili distingiĝas de najbaraj popoloj. Tamen superregas iliaj bonkoreco kaj konfidemo. Ili plene kunvivas la ĝojojn kaj zorgojn de siaj vizitantoj kaj ĉiam kapablas penetri en iliajn sentojn. Slovakio estas lando de amikoj.

Popolaj metioj kaj kostumoj, popolaj muziko kaj dancado transdoniĝas en Slovakio de generacio al generacio. En ĉiu valo estas malsamaj kulturaj tradicioj kaj folkloro. En Slovakio okazas tutjare multe da folkloraj festivaloj kaj eventoj. En la monda listo de nemateria heredaĵo de Unesko troviĝas *fujara* (speco de ŝalmo) kaj la muziko de Terchová, kaj enlistigon atendas la foiro de Radvaň kaj sakŝalmo.




Antikveco kun moderno

Partopreno en la Universala Kongreso en la urbo Nitra, per kiu ekskribiĝos la ĉapitro de la dua jarcento de kongresoj, estas eksterordinara kaj unika oportuno por esperantistoj. La kongreso ambicias alporti al la Esperanta movado junecon, vigecon, vivĝojn kaj pacan kunekzistadon de nacioj. Tia estas ankaŭ la urbo Nitra, kie historio interligiĝas kun estonteco, kie junuloj ĉerpas el la sperto de pli aĝaj generacioj, kie slovakoj kunvivas paco kun aliaj etnoj.

Nitra, kun 80 920 loĝantoj, estas la kvina plej granda urbo en Slovakio, kun bunta kultura kaj komerca vivo. Ĉiujare okazas tie la festivaloj Divadelná Nitra (Teatra Nitra), Nitrianska hudobná jar (Nitra muzika printempo), Celoslovenské dožinkové slávnosti (Tutslovakia rikoltfestoj) kaj multaj internaciaj ekspozicioj kaj foiroj.

La antikva Nitra estas la plej malnova urbo en Slovakio, ekestinta sur sep montetoj simile al Romo. Ĝia teritorio estas priloĝata tridek mil jarojn. Nitra estis la sidejo de la princo Pribina, kiu konstruigis en la urbo la unuan kristanan preĝejon en Slovakio. La reĝo Rastislav invitis ĉi tien la tesalonikajn fratojn Konstanteno kaj Metodo, kiuj disvastigis la kristanan kredon en la lingvo de la loka loĝantaro kaj kreis la unuan slavan skrib-sistemon: glagolico.



La ĉefa monumento de Nitra estas ĝia kastelo, kiu en pasinteco sukcesis rezisti eĉ mongolajn atakojn. Oni aliras la kastelon tra Horné mesto (Supra urbo), en kiu troviĝas valoraj historiaj konstruaĵoj: la preĝejo de sanktaj Petro kaj Paŭlo, la seminariejoj Malý seminár kaj Veľký seminár kun unika dioceza biblioteko, en kiu troviĝas centoj da raraj libroj, inkunabloj kaj manskribaĵoj, la palaco Kluchov palác, kies angulon subtenas ŝtona atlanto, kiun nitranoj nomas Corgoň.

En Nitra estas ankaŭ novaj kvartaloj kaj domaroj, parkoj, statuoj, modernaj konstruaĵoj kaj aranĝitaj spacoj, fabrikoj, teatroj kaj galerioj. En la unika ekspoziciejo Agrokompleso regule okazas ekspozicioj kaj foiroj. Nitra estas juna danke al granda kvanto de mezlernejoj kaj du universitatoj: la Universitato de Konstanteno Filozofo kaj la Slovaka agrokultura universitato.

La komplekso de la Slovaka agrokultura universitato, kiu estos la kongresejo, estas unu el la plej alte taksataj arkitekturaj verkoj de la 20-a jarcento en Slovakio. Ĝi ricevis en 2001 post tutlanda enketo la titolon Konstruaĵo de la jarcento. La ĉefa elemento de la komplekso estas la granda solenejo (Aula maxima), kun 36-metra diametro kaj 600-persona kapacito, kiu iĝis unu el la ĉefmonumentoj de Nitra. En alta naŭetaĝa konstruaĵo troviĝas rektorejo kaj priteoriaj lernoĉambroj. En sepetaĝaj pavilonoj estas laboratorioj, prelegejoj kaj lernoĉambroj. Al la komplekso apartenas ankaŭ botanika ĝardeno kaj kelkaj modernaj studenthejmoj.

